


**Grupo Esperantista de Bilbao**
Barrencalle Barrena, 7-1ª deks.
48005-BILBAO (Hispanujo)
✍ *Redaktas:*
Jesús-Miguel García Iturrioz

**Kunven-tago:**
Vendredo (19:30-21:00 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

(La E-Grupo de Bilbao estis fondita la 20an de majo de 1906)
TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: **60 €.** ● Familia: **70 €.** ● Juna (ĝis 30 jaroj): **20 €.**
**KUTXABANK-konto** (IBAN-kodo): **ES44-2095-0023-5122-1800-1550**

**APRILO-JUNIO 2024** **Nro. 139 (2/24)**



## Nova Prezidantino.

Dum ĝenerala kunveno okazinta la 12an de aprilo, oni nomumis novan estraron. Ene de ĝi, oni ŝanĝis la prezidantecon. Ekde nun ni havas novan prezidantinon, nome, Mila Mezo del Río.

**LOKE**



## **Nova estraro**.

Jen la nova estraro elektita dum la ĝenerala kunveno de la 12ª de aprilo:
De maldekstre dekstren,
Staras: David Redondo (Vicprezidanto) - Mila Mezo (Prezidantino) - Iciar Arteche (Kasistino) - Octavio Gutiérrez (Voĉdonanto kaj vickasisto).
Kaŭras: Paco López (Voĉdonanto) - Jesús M. García (Sekretario).

## **Komencis la riparoj en la konstruaĵo**.

Post kelkaj prokrastoj, ŝanĝoj kaj refaro de buĝetoj, la 20an de junio komencis la anoncita riparo de la konstruaĵo kie nestas nia sidejo. Laŭ la lasta informo, ni devas pagi 9.117,58 eŭrojn.

Alie, ni petis subvencion al la Vaska Registaro kaj al SURBISA, societo de la Magistrato de Bilbao, kiu donas monon por riparoj en la domoj de la malnova parto de la urbo. Sed ili rifuzis nian peton. La kialo estas, ke antaŭ tri jaroj oni ŝanĝis la leĝon kaj nuntempe oni subvencias nur al homoj, ne al societoj.

## **Naskiĝtago de nia E-Grupo**.

Ni ne memoris pri tio sed la pasintan 20an de majo nia E-Grupo 118-jariĝis. Ni gratulu ĝin.

**LOKE**

## Vizitis nin.



La vendredon 22an de marto vizitis nin grupo de francoj el urbo Tuluzo. Matene kaj posttagmeze ili trairis Bilbaon sub gvida ĉiĉeronado de Igone. Jam vespere, iom lacaj, ili vizitis nian Grupejon, kie ni regalis ilin per picoj kaj trinkaĵoj.

La sekvontan tagon, sabate, la ĉiĉerono estis Jesús, kiu atendis ilin ĉe la metrostacio de Portugalete por montri al ili la malnovan parton de la urbo. Post transiro de la marrivero ene de la fama "pendoponto", estis tempo por viziti la urbon Getxo (prononcu Geĉo), kie finiĝis la vizito ĉe la tiea metrostacio.

## Daŭrigas la E-kurso.

David, ĉefinstruisto de la ĉijara kurso, ne povis daŭrigi ĝian gvidadon pro malsano. Pro tio, devis anstataŭi lin Edorta, je la komenco, kaj Pako, poste. Ni dankas ilian sindonemon.

La kurso finiĝos la lastan vendredon de junio, t.e., la 28an de junio.

## Feria periodo.

Pro somera feriado, nia sidejo restos fermita ĝis la unua vendredo de septembro, t.e., ĝis la 6a de septembro.

Tamen, kelkaj estraranoj vizitos la sidejon dum la somero kaj legos la mesaĝojn ricevitajn en nia reta adreso: esperantobi@gmail.com.

**LOKE**

## **Eŭropa kongreso**.

Inter la 8ª kaj la 12ª de majo oni okazigis eŭropan kongreson en Strasburgo.
Ĝin partoprenis reprezentanto de nia E-grupo, nome, ĝia nova prezidantino, Mila Mezo.




Parto de la partoprenantoj.




Mila kun nia amikino Antoaneta Nikolaeva, el Bulgario



Mila kun nia amiko Konrad Fischer, el Tubingo (Germanujo)

# HEF

## HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO




Kiel anoncite, la 82-a Hispana Esperanto-Kongreso okazos ĉi-jare en la valencia urbo Cheste, de la 5-a ĝis la 8-a de septembro 2024.

Cheste situas je ĉirkaŭ 30 kilometroj de la urbo Valencio, kaj havas gravan rilaton kun Esperanto, ĉar historie ĝi havis unu el la plej altaj proporcioj de parolantoj de la internacia lingvo rilate al la loĝantaro. Eĉ du stratoj havas nomojn de esperantistaj aktivuloj. La specifa sidejo estos la impresa “Eduka Komplekso”, pli konata kiel la malnova “Labora Universitato”, kie ankaŭ eblos loĝi.

Oni jam prilaboras la kongresan programon, kiu, kiel kutimas en niaj renkontiĝoj, havos gravan kulturan komponanton, sed ankaŭ distran kaj turisman parton, kaj ankaŭ la eblecon praktiki Esperanton kun prelegantoj el diversaj lokoj, el Hispanio kaj aliaj landoj.

Precipe por vizitantoj venantaj el malproksimaj lokoj, estas planata tre ampleksa postkongresa programo, kun vizitoj al diversaj lokoj de la valencia regiono, gvidataj de lokaj esperantistoj.

Jam disponeblas de antaŭlonge la retejo de la Kongreso:

**https://kongreso.esperanto.es/**

Je la 20a de junio estis 79 aliĝintoj.

## SAT-en-Hispanio eldonis novan libron.




Kun titolo “Volontuloj kun okulvitroj” ĝi temas pri partopreno de eksterhispaniaj volontuloj en la hispana enlanda milito (1936/1939). La libro konsistas ĉefe el du verkoj, membiografiaj, kiuj rakontas la spertojn de du tiaj vizitantoj, plus aliaj klarigaj tekstoj.

La unua estas fakte reeldono: "La hispana tragedio", de la nederlanda verkisto Jef Last, kiu partoprenis la militon kiel volontulo, kaj la alia, "Hispana somero", de la norvega aŭtoro Nordahl Grieg, kiu raportis pri ĝi kaj rakontas siajn spertojn. La libro ankaŭ entenas studaĵon pri la milito, la rolo de eksterhispaniaj volontuloj kaj de intelektuloj, plus biografioj de la aŭtoroj kaj aliaj tekstoj.

Pliajn informojn vi povas trovi en:
https://www.nodo50.org/esperanto/nova-libro-eldonita-de-sateh-volontuloj-kun-okulvitroj/

La prezo estas 15 eŭroj. Vi povas aĉeti ĝin skribante al: <manolo.parra@yahoo.es>

*(Toño del Barrio. 19/06/2024)*

HEF

## Nova libro de Miguel Fernández.




La eldonejo Lastura anoncis la aperon de nova libro de Miguel Fernández, kun titolo “La palabra y el viento”. Kvankam en la hispana, la libro estas prezentata kiel produkto de la Esperanto-literaturo: temas pri kvin noveloj el “La vorto kaj la vento”, publikigita en Esperanto de Eldonejo Mondial.

La libro estas akirebla en la librovendejoj jam ekde majo. Ankaŭ eblas ĝin aĉeti en la retejo de Lastura, kie oni povas legi pliajn detalojn.

Krome, vi povas koni pliajn detalojn pere de la intervjuo kiun la poeto Armando Silles faris al Miguel en la programo “Olvida tu equipaje” (Forgesu vian bagaĝon), kiun li gvidas ĉiuvendrede ĉe la madrida Radio Utopía (Radio Utopio), Ĝi estas aŭskultebla en podkasta formo en tiu ĉi ligilo (hispanlingve).

*(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 94. Junio 2024)*

### VIZITO AL LA FONDAĴO VICENTE RISCO.



En aprilo, la direktoro de la Fondaĵo Esperanto, José Antonio del Barrio, vizitis la sidejon de la Fondaĵo Vicente Risco en Allariz (provinco Oŭrenso, Galegio) kaj renkontiĝis kun ties prezidanto kaj sekretario, por studi la iamajn rilatojn de Risco kun Esperanto.

Vicente Risco estis unu el la plej gravaj intelektuloj de la unua duono de la pasinta jarcento en Galegio kaj unu el la patroj de la galega naciismo.



En la sidejo de tiu fondaĵo konserviĝas ekzemplero de la Fundamento de Esperanto eldonita en 1906 kaj notoj faritaj de Risco mem, en kiu evidentiĝas ke li studis la lingvon. Li ankaŭ havis proksimajn rilatojn kun la ĉefaj esperantistoj de sia tempo en Oŭrenso.

Pri tiuj rilatoj de Risco kun Esperanto aperos artikolo en la venonta numero de la revuo “Boletín” de la HEF.

*(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 94. Junio 2024)*

### ARTIKOLO PRI LA BIBLIOTEKO DE HEF.

En junio la kultura retejo Alquibla publikigis detalan artikolon pri Biblioteko Juan Régulo Pérez de Hispana Esperanto-Federacio. Vi povas legi ĝin en https://www.alquiblaweb.com/2024/06/13/conoce-la-biblioteca-juan-regulo-perez-en-madrid/

*(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 94. Junio 2024)*

## TRA LA MONDO …

### Almenaŭ unu eŭropa deputito scipovas Esperanton.



Li estas Vytenis Andriukaitis, kuracisto, kirurgo, historiisto, litova politika kaj publika figuro, membro de la Social-Demokrata Litova Partio (Lietuvos Socialdemokratų Partija), sanministro de 2012 ĝis 2014.
https://eo.wikipedia.org/wiki/Vytenis_Andriukaitis


### Ekstravagancaj partioj.

Okaze de balotado por la eŭropa parlamento, eblis legi diversajn artikolojn pri la partioj, kiuj sin prezentis al ĝi. Jen tiu ĉi malgranda referenco al Esperanto disvastigita de la ĉefa hispana novaĵagentejo “efe” (“fo”) (04/06/2024):

(**Hispane**) *“Topar el precio de la cerveza o instaurar el esperanto: partidos excéntricos en campaña para las europes.*
***El esperanto, lengua oficial de la UE**. En Francia, para estos comicios, una de las candidaturas más llamativas es “Esperanto lengua común”, que pide promover el aprendizaje de este idioma y oficializarlo como lengua común de la UE por su carácter equitativo”*.

(**Esperante**) “*Limigi la prezon de biero aŭ establi esperanton: ekstravagancaj partioj kampanje por la eŭropaj.*
***Esperanto, oficiala lingvo de EU**. En Francio, por tiu ĉi balotado, unu el la plej okulfrapaj kandidatiĝoj estas “Esperanto komuna lingvo”, kiu postulas stimuli la lernadon de tiu ĉi lingvo kaj oficialigi ĝin kiel komuna lingvo de EU pro ĝia justa karaktero*”.

Simbolo de la partio “Europe-Democratie-Esperanto”




Tiu partio, Eŭropo-Demokratio-Esperano lanĉis bonkvalitan varbvideofilmon por la eŭropaj balotoj. Tiel ke ĝi prezentiĝis nur en Francio, la dialogoj estas plejparte en la franca, subtitolitaj en Esperanto.
Vi povas spekti ĝin ĉe jutubo:

https://www.youtube.com/watch?v=IR43AX1qfXA

## TRA LA MONDO …

## Etsuo Miyoshi leteras al eŭropaj parlamentanoj.



La emerita japana entreprenisto Etsuo Miyoshi daŭrigas sian reklamkampanjon por Esperanto en EU.

Li nun sendis leteron kaj anglalingvan libron pri la lingva problemo al germanaj kaj francaj parlamentanoj sur nacia kaj eŭropa niveloj. Jam en 2012 Miyoshi rakontis al *Libera Folio,* ke li kredas je fina venko de Esperanto en Eŭropa Unio.

*("Libera Folio". 30/04/2024)*

## La 110-a UK okazos en 2025 – en Brno, Ĉeĥio!

Kiam ankoraŭ oni ne okazigis la ĉi jaran UKon en Aruŝo (Tanzanio), UEA disvastigis la urbon, kie oni organizos la venontjaran.

Por la 110-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) la Estraro de UEA elektis Ĉeĥion kiel kongreslandon. La bela Brno estos la kongresurbo.

La UK okazos en Ĉeĥio la duan fojon: antaŭe dufoje ĝi okazis en Prago (1921 kaj 1996), sed en 1921 la urbo ankoraŭ estis ĉefurbo de la tiama Ĉeĥoslovakio (kiu fariĝis Ĉeĥio kaj Slovakio en 1993).

La gastiga urbo de 2025 tamen estos Brno: kun ĉ. 400 000 loĝantoj, ĝi estas la dua plej granda urbo de Ĉeĥio, en la sudorienta parto de la lando. Brno fondiĝis en 1243 kaj do havas riĉan historion kaj interesajn vidindaĵojn. Ĝi estas la historia ĉefurbo kaj plej granda urbo de Moravio, hodiaŭ funkcianta kiel statuta urbo kaj administra centro de la Sudmoravia Regiono.

La Esperanto-klubo de Brno estas la plej malnova en Ĉeĥio kaj eĉ en la tuta teritorio de la iama Aŭstrio-Hungario. Jam en 1901 ekestis en Brno organizita grupo de esperantistoj, kiu estis la unua en la tiama Aŭstrio-Hungario kaj tial nomis sin *Unua societo de aŭstriaj esperantistoj*.

La 110-a UK estas planata por okazi de la 19-a ĝis la 26-a de julio. La kongresejo estos la Universitato Mendelu (Mendel-Universitato en Brno).

(Gazetaraj komunikoj de UEA. Nro. 1164. 23/03/2024)

## VENONTAJ E-ARANĜOJ.

- 109a Universala Kongreso. Aruŝo (Tanzanio). 3-10 aŭgusto 2024.
- SAT-kongreso. Oporto. 5-11 aŭgusto 2024.
- 2024 IJK. Ŝventoji (Litovio). 18-25 aŭgusto.
- 82a Hispana Kongreso. Cheste (Valencio). 5-8 Septembro 2024.
- 83a Hispana Kongreso. Soria. Probable, 1-4 majo 2025.
- 110a Universala Kongreso. Brno (Ĉeĥio). Probable, 19-26 julio 2025.